DOI:10.59718/ees13975

Esperantologio / Esperanto Studies **8** (2018), 69–70

Zbigniew Galor — esperantista sociologo (1952–2017)

Jukka Pietiläinen

La konata esperantista sociologo Zbigniew Galor forpasis la 27-an de januaro 2017 en Poznano (pole Poznań). Li naskiĝis la 16-an de julio 1952 en Szczecin [ŝĉeĉin] en nord-okcidenta Pollando. Mi havis eblecon koni lin dum pluraj jaroj, kaj ni kune planis kaj realigis sociologian esploron inter la kongresanoj de la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009 — post la kongreso eĉ pli da personoj respondis al nia enketilo. La rezultoj aperis en la libro *UEA en konscio de esperantistoj* (2015), kiun ni kune verkis. Zbigniew, ankaŭ konata kiel Zbyszek, estis unu el malmultaj esperantistaj fakuloj en sociaj sciencoj kiuj havis profesiajn kvalifikojn kaj estis rekonata ankaŭ ekster esperantistaj rondoj.

Zbigniew Galor estis habiliĝinta doktoro pri sociologio kaj laboris kiel profesoro kaj estro de la katedro pri ĝenerala sociologio en la Universitato de Szczecin. Li lernis esperanton en 1968. Jam en siaj studentaj jaroj li fondis la unuan sciencan studentan rondon pri esperanto ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań.

Li magistriĝis pri sociologio ĉe UAM en 1976 kaj doktoriĝis ĉe la universitato Maria Curie-Skłodowska en Lublin en la jaro 1988. Lia doktora disertaĵo temis pri kooperativa posedo kiel ekonomia kaj sociologia kategorio. Zbigniew habitiliĝis ĉe UAM en Poznań en 2006; lia disertaĵo temis pri neformala ekonomio kiel socia fenomeno. Por tio li uzis la koncepton lumpenposedaĵo (*Lumpenwłasność*), per kiu li celis posedaĵon kaj enspezojn kiuj ekzistas ekster la formala, ekzemple impostata, ekonomia sistemo.

Lia sociologia laboro estas publikigita plejparte en la pola lingvo, kaj li esploris aparte marĝenulojn, malriĉulojn, migrantojn, turismon, kaj, pli ĝenerale, la socian strukturon kaj socian ŝanĝiĝon en Pollando de socialismo al kapitalismo. Ankaŭ esperanto estis ofte inter liaj esplortemoj, kaj li ankaŭ verkis plurajn sciencajn artikolojn en esperanto. En la angla lingvo aperis nur kelkaj tekstoj, plejparte en konferencaj kolektoj, sed li kontribuis ankaŭ al la renoma *Routledge Handbook of World-Systems Analysis* per artikolo pri

lumpen-ekonomio kiel alia flanko de tutmonda ekonomio. En la pola lingvo li publikigis ĉe renomaj sociologiaj revuoj kiel *Studia Socjologiczne*.

Li prelegis pri sociologio de esperanto kaj pri esperanta kulturo en la *Interlingvistikaj Studoj* ĉe UAM; krome li partoprenis plurfoje esperantologiajn konferencojn kaj verkis plurajn sciencajn artikolojn en esperanto. Ankaŭ en esperanto li fokusigis atenton al la esperanto-komunumo kiel marĝenula fenomeno kaj esploris la esperanto-komunumon kiel sociologian fenomenon. La enketo dum la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009 okazis pro lia iniciato, kaj por kompilado de libroforma sociologia analizo de esperanto kaj esperantistoj estis origine planata granda aro da esploristoj — tamen fine restis nur li kaj mi, kiuj kompilis libron, kiun eldonis KAVA-PECH kaj financis Esperantic Studies Foundation. Vere internacia esperanta projekto.

Zbigniew volis antaŭenigi kunlaboron inter esperantistaj sociologoj kaj soci-sciencistoj kaj profesian sociologian esploradon de esperanto, kaj tiucele li iniciatis fondon de la Sociscienca Esplor-Grupo, kiu kunvenis dum kelkaj universalaj kongresoj.

Li ankaŭ verkis poemojn kaj tradukis polajn kanzonojn en esperanton kaj kontribuis al pluraj esperanto-revuoj kiel ekzemple *La Ondo de Esperanto* kaj *Pola Esperantisto*, kaj aktivis en organizado de la kultura festivalo *Arkones*. Lia edzino estis profesoro Ilona Koutny.

La listo de publikaĵoj de Zbigniew kaj ankaŭ kelkaj tekstoj en esperanto kaj en la pola troveblas ĉe la adreso
`http://www.zbigniewgalor.pl/?file=esperanto#publikajoj` .

Jukka Pietiläinen estas docento ĉe Helsinka universitato kaj esploras pri amasmedioj, internacia komunikado, sociologio kaj sociolingvistiko.

Paperpoŝta adreso de la verkinto: Poŝtkesto 42, FI-00014 University of Helsinki, Helsinki
Retpoŝta adreso: `jukka.pietilainen@helsinki.fi`

Ricevita 2017-06-21
Akceptita por publikigo 2017-06-30